

# HEJES

JUNULARA SEKCIO

HISPANA ESPERANTO



FEDERACIO

Nro. 55 - 1967

REDAKTORO: Sro. J. M.<sup>a</sup> SERRANO  
Merceria, 7, 3.<sup>o</sup> - TARRAGONA (Hispanujo)



"MADRIDO" 53<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto

# CASAL VILAFRANCA ESPERANTO-GRUPO

Oni okazigas Esperanto-kursojn marte kaj vendrede de la 8:30 ĝis la 9:30 vespere.

VILAFRANCA DEL PENEDES havas 14.000 loĝantojn kaj ĉi tiu urbo estas apud la monto Sant Miquel kun eltrovitaj prahistoriaj restaĵoj. Je 16 kilometroj estas la bela marborda urbo Vilafranca. En tiu distanco oni trovas la industriajn vilanojn Vilafranca kaj La Cretu, banita per la Mediteranea maro.

Oni povas admiri en la ĉirkaŭaĵoj de Vilafranca la jenajn vidindaĵojn: Sant Marti Sarroca kun antikva preĝejo romanida kaj vizitinda kastelo de la jaro 1.400. Ankaŭ romanida preĝejo en Moja (Olèrdola) kaj Sant Sebastia dels Gorgs. kaj ruĝaj monumentoj en Foix kaj Castelvi de la Marca.

Krom la menciitaj mirindaĵoj oni preskaŭ devige devas viziti la Muzeon de la Vino, en la urbo Vilafranca, unika en la mondo: la Katedralon en kies kriptoj ekzistas Llimona skulptaĵoj: la monumentojn al la Vino kaj al "Niquets" (Homaj Turoj).

Ĝeneralaĵoj, ĉiuj niaj membroj kun la propraj okupoj:

Restoracio kaj kafejo  
boteloj en specialaj skatoloj, laŭ deziroj. Str. Duano de la Victoria, 33. T. 70.

Restoracio RND  
por la ĉiuj

Restoracio DOMINGO. — Inda pro la servoj kaj bongustaj manĝaĵoj. Promenejo San Francisco, 13. T. 219.

Ŝtatestro PLANS. — Interkonsilisto por la markoj. A. 1.

Automobiloj JOSEP PERELLO. — Ekskluziva agente de la aŭtomobiloj CITROEN kun meĥanika servo. Disdonisto de la pneŭmatikoj MICHELIN kaj PIRELLI. Str. Calvo Sotelo, 57. T. 363.

1

24-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO

27-a de julio ĝis 3-a de aŭgusto de 1968-a

T A R R A G O N O

L.K.K.

Prezidanto .....S-ro Jose Serrano

Vicprezidanto....S-ro Salvador Aragay

Sekretariino ....S-ino Magencia Garcia de Font

Kasisto .....S-ro Joan Font

Komisiitoj

Ekskursoj.....S-ro Francisco Ruiz

Gravuraĵoj .....S-ro Jordi Guma

Sekretariaj aferoj. S-ino. J.Girona de Aragay

Informado .....P-ro Jaime Aragay

Aŭtoritataj Rilatoj...Pro. Evelio Calvet

PETU INFORMOJN . VICPREZIDANTO. S-ro Salvador  
Aragay. Str. Arce 8-2-4

CORNELLA (HISPANUJO)

Lastan daton por aliĝi .... 30-an de JUNIO-1968

Oni konsideros "Membroj Kongresanoj" la esperantistoj ĝis 25 jaroj; la aliaj partoprenontoj pli aĝaj estos konsiderotaj kiel GASTOJ

^^^^^^^^^^^^^^^^^^

PROGRAMO . Oratora Konkurso. Konferencoj, Diskutoj. Kulturaj Vizitoj. Inaŭgurado de HEF Junulara Restadejo Esperantista HEJS. Balon.







Gi ne estas tre kontentiga lernobjekto por la tria celo de niaj lernejoj, nome la kontrolado,


ĉar la infanoj kondukas pli bone, kiam ili faras ion, kion ili povas fari laŭ sia propra kapablo. En tiuj okazoj ili trovas la lecionojn interesaj.

Do ni devas konkludi ke lingva lernobjekto -- Kiel ekzemple la Franca -- estas inkludita en lernprogramo simple nur pro eduka aŭ kultura valoro. Ni malkaŝe parolu -- Gi ne havas edukon nek kulturan valoron. Lernado de longaj listoj da vortoj kaj da multnombraj formoj de neregulaj verboj ne havas pli da kulturvaloro ol la lernado de la nomoj de la ĉevaloj gajnintaj la Melburnan Pokalon dum la lastaj cent jaroj.

Kulturo ne venas el vortoj, sed el la ideoj, kiujn esprimas la vortoj. Gi venas el la interŝanĝo de ideoj inter personoj -- el la pli bona kompreno de la vivarto kaj akiro de tiu sciado, kiu helpas en tiu pli bona kompreno. Neniu kulturo rezultas el lernado de lingvoj ĝis homoj atingas kompetentecon paroli kaj legi ilin sambone kiel indiĝeno. Malmultaj studentoj atingas tiun gradon. Ni malŝparas nian tempon, kiam ni instruas tiujn duajn lingvojn. Ĉu se ni sukcesas kompetentiĝi en unu el tiuj lingvoj -- ekzemple la Franca -- ankoraŭ restas fermitaj por ni la Germana, Hispana, Rusa, Aziaj kaj aliaj landoj. Kiel tre malmulta profito kontraŭ tiomege da peno!

Kion oni evidente bezonas, tio estas dua lingvo, kiu estas facile sed koncize uzpreta, kaj krom tio povosciata de ĉiuj homoj en la mondo. La sciado de tia universala lingvo estas ne nur tre utila kapablaĵo, sed ankaŭ havas la kulturajn avantaĝojn, kiujn la naciaj lingvoj ne posedas. Ni povus grandege vastigi niajn interhomajn kontaktojn. Ni povus senlime multigi la interŝanĝojn de ideoj.

Ekzistas tia lingvo, jam vaste uzata kaj uzpreta por la uzado de ĉiuj -- la internacia lingvo, Esperanto. Oni povas ĝin lerni en dekono de la tempo, kiun oni bezonas por lerni ekzemple la Francan.



La Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj devus urĝi ĉiujn landojn instrui Esperanton kiel la duan lingvon en la lernejoj de la mondo. Baldaŭ ĉiu homo en la mondo povus komuniki kun ĉiu alia. Tio estus grandega antaŭenpaŝo sur la vojo de l' homa progreso.

Tamen niaj edukistoj timeme hezitas antaŭ tiu klarevidente praktika paŝo direkte al la riĉigo de nia vivo, la pli bona kompreno pri niaj kunvivuloj la antaŭenigo de paca kunlaboro pli granda vojaĝkomforto kaj pli granda komerca facililo.

Jen kelkaj interesaj faktoj pri kiuj Aŭstralianoj povas mediti rilate Esperanton. Oni trovas Esperantajn Asociojn en 50 landoj, inkluzive la grandajn naciojn Britujo, Usono, Sovet-Unio, Ĉinujo, Germanujo, krom la malgrandaj Angolo, Cejlono, Kolombio, Linhtens-tejno.

Ekzistas grandaj bibliotekoj kun tradukita literaturo antikva kaj moderna kaj ankaŭ originalaj verkoj en prozo kaj en poezio.

Katedroj de Esperanto troviĝas en kelkaj universitatoj. La lasta, kiun oni establis, estas ĉe la Universitato de Laguna, Kamariaj Insuloj.

Radiostacioj en 24 landoj divastigas regulajn programojn en Esperanto, kaj 115 Esperantaj gazetoj estas regule eldonataj.

Ĉiujare Esperanta Mondkongreso okazas ĉe kiu ĉeestas centoj kaj iufoje miloj da Esperantistoj reprezentantaj proksimume 40 landoj.

La Kongreso de 1966 okazis en Budapeŝto, Hungarujo, kaj en Rotterdamo en 1967 kaj en 1968 okazos en Madrido, Hispanujo. La ŝtato Victoria antaŭetendis fierinde altan lokon en la edukado. Kiel unua el ĉiuj ŝtatoj kaj landoj en la mondo, ĝi enkondukis senpagan kaj devigan edukadon por ĉiuj infanoj en la jaro 1872. Estus bela afero se oni povus celebri en 1972 la centjaron de tiu evento per okazigo en Melburno de la 57-a Esperanta Mondkongreso. Certe se ni volas fari tion, ni devas komenci lerni la lingvon kaj enkonduki ĝin en niajn lernejojn kaj universitatojn.

11-a INTERNACIA SEMINARIO  
de Germana Esperanto-Junularo  
=====

En WURZBURG, universitata urbo kun 125.000 enloĝantoj apud la rivero Main en norda Bavario, okazos de la 27-a decembro de 1967 ĝis la 3-a januaro 1968 la 11-a INTERNACIA SEMINARIO. La Seminariejo estos la granda, modernigita junulargastejo en la urbcentro. La temo de tiu ĉi dua seminario en la ses-parta serio pri "Esencaj Trajtoj de la hodiaŭa mondo" estos:

"RELIGIOJ KAJ FILOZOFIOJ EN LA 20-a JARCENTO"

La programo ampleksos proksimume 8 referatojn pri specialajn aspektojn aspektoj de la temo; prelegos i.a. profesoro d-ro. Iv. Lapenna pri dialektika kaj historia materiismo, kaj redaktoro Stefan Maul pri fundamentaĵoj de la kristana kredo kaj pri la tolerec-dekreto de la dua vatikana koncilo.

Dum la 11-a I.S. okazos "seminarieto por junular-gvidantoj", kiun organizas TEJO kaj kies programo konsistos el prelegoj kaj diskutoj pri la Esperanto-Movado kaj problemoj de la agadmetodoj inter gejunuloj. Partopreni povos invititoj kaj reprezentantoj de Landaj Sekcioj de TEJO. Detalojn vi petu indikante vian partoprenon en la I.S.-aliĝilo.

Se vi intencas submeti vin al la Internacia Ekzameno, ankaŭ tio vi povos fari dum la I.S. en Würzburg.

Por aliĝilojn kaj informojn, skribu al la Sekretario de la Konstanta Komitato:

S-ro Uwe Joachim Moritz, Hafenstr 75  
44 MUNSTER, Germanio

•••••



HEF JUNULARA RESTADEJO ESPERANTISTA HEJS

MONISTROL DE MONTSERRAT ( BARCELONO )

NOVJARA JUNULARA FESTO KAJ EKSKURSO

TAGOJ 30-31 Decembro kaj 1 Januaro 1968

Gelegantoj ! Gesamideanoj! Geamikoj !

Post kelkaj semajnoj finos la nuna jaro 1967 kaj komencos novan jaron, kiu, certe signifos multe por nia Esperanta laboro. H.E.J.S. deziras festi brile la eniron de la nova jaro 1968-a, tiel de HEJS-estraro planis por la lastaj tagoj de Decembro kaj la 1-a de Januaro, ekskurson kaj feston en via Restadejo.

Pro tio dezirante ĉirkaŭbraki ĉiujn niajn amikojn kaj esperantistoj de nia regiono, ni invitas vin estimata abonanto kaj vi amiko de nia kara HEJS-bulteno partopreni en la aranĝoj. Ni atendas kore vin

PROGRAMO

Sabato 30. 19 h. Kunveno en (Fonda Chica)

19,30 h. Malfermila Restadejo

21 h. Noktomanĝon

~~22~~ h. Tenduma fairo

Dimanĝo 31. 7 h. Eliro de la Restadejo

kaj ekskurso

14 h. Tagmanĝo en la Restadejo

17 h. Organizado de Novjara Fes

21 h. Noktomanĝo kaj Novjara Fes

Lundo 1. 9 h. Tagmanĝo



Lundo 1 11 h. Ekskurso tra la ĉir-  
 . . . . . kaŭaĵoj de Monistrol  
 14 h. Tagmanĝo  
 18 h. Fermo de la Restadejo

Ĉiu partoprenonto devos kunporti dormosakon.  
 aŭ ion similan, kaj la ilojn pli necesajn por a-  
 rangi la manĝaĵojn.

Malgraŭ ke eble oni povos aĉeti en la urbeto  
 diversajn manĝaĵojn ni konsilas vin kunporti ilin

**KAJ NIA PLI SERIOZA PETO : KOMUNIKU AL HEJS-  
 ESTRARO, KIAM KAJ KIEL vi alvenos al Monistrol.  
 Se vi deziras ni atendos vin en la (Fonda Chica)  
 laŭ viaj indikoj.**

RESTADEJA KOTIZO. Tage. HEJS-ano 25 ptoj  
 ne HEJS-ano 35 ptoj

HEJS-ESTRARO

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

LASTAJ MEMBROJ PROTEKTANTOJ DE LA RESTADEJO

Feliĉe kelkaj samideanoj respondis tre  
 volonte al nia alvoko de la antaŭa numero de  
 HEJS. La supera tegmento jam estas konstruita.  
 Sinceran kaj keran dankon al ĉiuj.

S-ro. Cecilio Olalla	Bilbao	500 ptoj
" Jose Borda	Sabadell	10,000 "
" Antonio Feijon	Guernica	1,000 "
" Alfonso Tur	Barcelona	5,000 "
" Liberto Puig	Sabadell	2,500 "
FAMILIA CRIACH (Plie)	Sabadell	5,000 "

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## LETEROJ AL MIA AMIKO SALVATORO

## Dua letero

=====

Bon' amiko: De kiam mi skribis al vi lastfoje pasis pli ol monato. Ĉu hodiaŭ mi trafos daŭrigi la temon tiam eksponitan? Verdire estas tiom da problemoj solvotaj al la nuntempa homo, ke facile nia intereso forflugas konfuze en la menso de afero al ali'afero, simile al birdo perdinta sian orientigon.

Tamen la kerno de multnombraj problemoj situas en la ekonomia afero. Tio signifas jen, ke laŭ ŝajne tiuj diversaj aferoj havas kcmunan devenon, tio estas, la malkorekta distribuode la riĉeco.

Antaŭ ne longe vizitis la esperantistojn de l' klubo "Amigos de la Unesco" nia elstara samideano Jesuo Paluzie, kiu estas vicprezidanto de la "International Union for Land Value and Free Trade", kaj ni konversaciis pri profundaj aferoj ĝis kiam la konversacio centriĝis en tiu bruliga afero nomata ekonomio. S-ro. Paluzie estas eminenta ekonomisto kaj eble la plej respondeca sekvanto de la ekonomia doktrino de H. George en nia lando. Do tiam li donis al ni ĉiuj kaj belegan lecionon pri ekonomio. Mi aŭskultis lin tre atente, sed ĉi ioma interna dubemo kaj eĉ ironio. Mi memoras ke mi refutis kelkajn liajn konceptojn, Ne de- cas ke mi priskribu ĉion detale, sed eble estas inter- esa scii lian respondon al ĉi tiu mia vidpunkto "Laŭ via altega konsidero koncerne la ekonomion- mi diris- eble vi opinias ke ĝi, la Ekonomio, envolvas la 75 % de la homara problemaro" "Ne tia -li respondis- sed la 95 % .

Dum multaj horoj mi meditis liajn vortojn . Certe tiu medito ne ŝanĝigos mian delongan inklinon al Humanismo, sed povas kontribui helpi mian kriterion pri la graveco korespondante al ĉia socia faktoro.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

.Ofte okazas ke fundamentaj partoj de Tuto estas flankenlasitaj. Doktoro Aleksis Carrel diris en sia libro "Man The Unknown", ke dum la sciencoj mekanikaj, fizikaj kaj kemiaj seninterompe antaŭeniras, la scienco pri la Homo mem restis forgesita. En sociaj tavoloj, dum la jura scienco pli kaj pli komplikiĝas, miksiĝas, plektiĝas, devigante ĉiun individuon al ne forlaseblajn moralajn, sanktegajn devigojn, dum tio okazadas laŭ la fludo de l'tempo, nenio nek neniu instruis la trompitan Homon pri la praktika, necesa, utila ekonomia scienco. Tiu ekonomia scinco instruas pri kio korespondas al ĉiu, pri la rajto de ĉiu homo al la tero kie naskiĝis ...

Ho, kara Salvatoro Amiko ! Tiel mi pensas nun. Ĉu pro tio mia emo kaj amo al Arto, al literaturo, al Filozofio mortos? Konstatu kiel tiuj diaĵoj bezonas la naivecon de la idealisto por plene ĝoje kreskadi. Tiel la mondo aperas plena de literaturo, plena de filozofio, sed malplena de socia justeco.

En ĉiu tempo, en ĉiu epoko, en ĉiu civilizacio, oni profunde kaj brile instruas la homojn songadi, revadi, sed kun malica perfido oni evitas instrui kiel kanalizi al praktika realaĵo tiun songadon, tiun revadon. Kaj tiel la homa familio progresadas sur la bazo de ne venkebla fantazio. La nuda realeco estas por multaj porka mizero, do oni serĉas la feliĉon per dangeŝaj artifikoj. La ĝojo, la bonŝanco, la delico estas faciliatingeblaj per drogado, sed sufero, la plorado, la malespero estas malvarme forpelitaj de tiu iluziiga submondo delicipsika al realaĵaj planoj. Pro tio ke la sufero kaj plorado ŝirmas en




la realaĵo de la ekzisto, ni luktu por ke la feliĉo kaj la fido staru ankaŭ ĉe la realaĵa flanko. Kiel tio estas farebla?

Amiko, mi finas ĉi tiun leteron lasante ŝvebitiun ĉi demandon, ĉar kvankam mi scias kiel en mia koro, ankoraŭ mi ne trovis vortojn kiuj ne estu senrezulta eterna sirena kantado, kiuj ne estu vulgare kaj ridinde konvenciaj.

Kiuj ne kunportu maron da sango

JOHANO VELEZ



FAKREVUO KUN INTERNACIA REPUTACIO REPUTACIO  
ENKONDUKIS ESPERANTON

La germanlingva fakrevuo "Der Chemischreiniger und Färber", revuo pri purigado kaj tinkturado de teksaĵoj, teksaĵkemio kaj parencaj fakoj, ekuzis esperanton por povi alparoli pli vastan legantaron.

Fakuloj el la supre menciitaj fakoj kaj esperantistoj kiuj povas interesi tiajn fakulojn mendu la revuon ĉe: "Der Chemischreiniger und Farber"

Verlag Waltwr de Bouché

Elisabethstr. 36

D-8000 Munchen 13, GERMANIO

La eldonejo korespondas esperantlingve. Jarabono kostas germanajn markojn 40.- Kvaronjara abono gm 10.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

DEZIRAS KORESPONDI. S-ro Waldemar Mackiewicz. Gnadsk  
 ul. Kepna 33/3. POLJANDO

S-ro. Tasuke Takahaŝi. Tokio.

2-3-9 Mukoga-oka Bunkjo-ku, JAPANUJO.

S-ro. Jancsar Robert, Salgotarjan,  
 O.T.P.P.F. ●O. HUNGARUJO.

S-ro. Bozga Josif, Baia Mare of 2

Casuta Postale 21. RUMANIA /  
 -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-



R A I M O N

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^  
 ^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

"He deixat ma mare sola  
 a Xàtiva, al carrer Blanc,  
 Ma mare que sempre espera  
 que torne com abans.

He deixat germans i amics  
 que em volen  
 i esperen, com ma mare  
 que jo torne com abans,

He vingut ací  
 perquè crec que puc dir-vos  
 paraules i fets  
 que encara ens agermanen.  
 Paraules i fets  
 que encara ens fan sentir.

Paraules i fets  
 que encara ens agermanen  
 en la lluita contra la por,  
 en la lluita contra la sang,  
 en la lluita contra el dolor,  
 en la lluita contra la fam.

En la sempre necessaria lluita  
 contra el que ens separa  
 i fa sentir-nos  
 a tots nosaltres estranys.

He deixat ma mare  
 i els meus germans.  
 He deixat els amics i la casa  
 i a tots els que esperen  
 que jo torne com abans.

I crec que he fet bé  
 Jo sé, jo sé, jo sé, jo sé  
 que tornaré al carrer Blanc

Peró ara ací  
 crec que també és ma casa  
 y crec que puc dir-vos,

amb el cor obert, a tots vosaltres :  
 germans. Germans ."

HEF JUNULARA ESPERANTISTA RESTADEJO HEJS

Nun ni jam povas informi al vi ke la Restadejo en Monistrol de Montserrat jam estas preta kaj estas je la dispono de HEJS -anoj kaj ne HEJS-anoj, ĉiu lasta sabadto kaj dimanĉo de ĉiu monato.

Tamen malgraŭ la efika helpo de niaj membroj protektantoj, mankas al HEJS-estraro plian pruntedonon. Pro tio ni apelacias al vi kara leganto bonvolu pripensi nian antaŭan peton. Samtempe ni detalias al vi novan specialan helpon pri la Restadejo;

S-ro.	H. Llusera	donacis	novan liton.
"	J. Sala	"	novan liton.
"	F. Ruiz	"	petrolea hejt'forno
"	T. Illanas	"	butana hejt'forno
"	J. Font	"	butana lumigilo.

Se alia esperantisto deziras agi same, anstataŭ aĉeti li mem la liton k.c., bonvolu kontaktigi kun la estraro kaj ĝi indikos al li la similan tipon, tiamaŭ niere, ĉiuj elementoj de la Restadejo estas similaj.

HEJS-estraro dankas al vi pro viaj donacoj kaj pruntedonoj. kaj deziras ĉiuj niaj abonantoj Feliĉan Kristnaskon kaj Prosperan Novan Jaron 1968-an.

-o-o-o-o-o-o-c-o-c-c-o-

PALABRAS DE LUDOVIKO ZAMENHOF

En 1905 (en Boulogne-Sur-Mer (Francio)-ler Congreso Universal de Esperanto;

"En este momento siento que no pertenezco a ninguna nación, a ningún partido, a ninguna religión.  
En este momento me siento solamente UN SER HUMANO

L.L.Z.

-o-o-o-o-o-o-●-c-o-o-o-o-o-

Lignajoj CANET.—Por la servo de la konstruado. Str. Cort, 41. T. 306.

Apotekisto L. M.<sup>a</sup> HERNANDEZ IZAL. en Sant Pau d'Ordal.—Je la servo de la bona sano en la regiono. A. 83 (Vilafranca del Penedès). T. 13.

Filatelisto BOLET.—Interŝanĝo de poŝtmarkoj. Placo Juan Alvarez, 35. T. 156. A. 14.

Presisto YSART.—Konstruado de skatoloj el kartono. Str. Oviedo, 5. T. 333.

Mebloj FELIU.—Sortimento por oficejoj, geedziĝoj kaj ĝeneralaj ornamaĵoj. Str. José Antonio, 19. T. 543.

Trinkejo SPORT.—Kafoj kaj malvarmtrinkaĵoj. Promenejo Nuestra Señora, 49. T. 718.

Vinagroj DURAN.—Aromigitaj el herboj, ellaborado el pura vino Str. Comercio, 36. T. 11.

GRAU.—Amatora fotografisto. Str. Benach, 4. T. 865.

CAMPANO, RAVENTOS CATASUS.—Aŭtentika kelo. Oni provizas kun etiketoj en Esperanto. Str. San Pedro, 8. T. 108.

Aŭtomobiloj SAN JOR (Renta-Car).—Taksimetroj. Luo sen ŝofero. Str. Amalia, 24. T. 580. J. Soga; Muntanĉe.

SEGUI MÜLLER.—Advokato Filatelisto. Str. G. Cortijo, 22. T. 523.

CASAS.—Feraĵvendejo-Kristaĵoj-Vitroj-kaj materialoj por la konstruado. Str. Ferrers, 3. T. 42.

GIRALT.—Pentristo de aŭtomobiloj. Av. Tarragona, 40. T. 459. - Kaj Str. Amalia, 85. T. 385.

SANS Bicikloj kaj motorcikloj. — Ĉiuj specoj por geinfanoj kaj plenkreskuloj. La eksterordinara motorciklo OSSA, la plej moderna por sportadi Modernaj TURNILOJ por la konstruado de industriaj aferoj, laŭ deziro Str. Tarragona, 16. A. 118. T. 458.





MADERAS  
CALLAU



Sans. 302 - Teléf. 239 05 24  
BARCELONA (14)

jovani

juegos ele-

PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83  
HOSPITALET - BARCELONA

ZURCIDORA

y

TEJEDORA  
ROSITA GALBANY

ijos  
41  
NA

VENDO RETALES

J. Cardellach



LA A





# UNUA OFICIALA BULTENO

53-a Universala Kongreso de Esperanto

1968 — Madrid — Hispanujo

U.K.: 3-10 Aŭg. 1968

▲ 4-a Internacia Arta Festivalo

▲ Postkongreso: 10-15 Aŭg. 1968

## Hispanujo

Se tri turistoj vizitus Hispanujon tra malsamaj vojoj, trapasante unu Andalucion kaj la mediteranean marbordon, alia la Nordan bordon kaj vizitante la tria la centron de la lando, ili priskribus Hispanujon je tri tute diversaj manieroj.

La unua trovas la turisman Hispanujon, t.e. tero de oranĝofloroj, olivujoj, blua ĉielo kaj brulanta suno.

La dua pensus sin trovi meze de iu ajn scenejo en Okcidenta Eŭropo, kun multnombraj industriaj centroj, hirtaj je kamentuboj, aŭ sentus la febran agitadon de la minejaj centroj.

Kaj la tria, sur la sekaj stepoj de Kastilja, povus sin supozi transportita al Tatario, meze de larĝaj kaj nudaj ebenaĵoj, limigitaj per la dentaj linioj de bluaj montaroj. Interne de la hispanaj limoj troviĝas regionoj similaj al aliaj en Okcidenta Eŭropo, Italujo, Grekujo, Afriko kaj Rusujo.

Vere, Hispanujo estas tero de kontrastoj.

Hispanujo estas ponto inter du kontinentoj, Eŭropo kaj Afriko, kaj barejo inter du maroj, Mediteraneo kaj Atlantiko. Ĝi ĉiam estis vojkruĉiĝo, altira punkto por diversaj etnikaj grupoj, kiuj kreigis en Hispanujo kaj fondis kelkajn malsimilajn civilizojn.

**Cef-Generalo Francisco Franco — Statprezidanto de Hispanujo**  
**Alta Protektanto de la 53-a U.K.**



## Madrid

Madrid estas unu el la plej kompleksaj eŭropaj urboj. De ĝiaj plej kosmopolitaj stratoj kun luksaj hoteloj, rafinitaj kafejoj, elegantaj vendejoj kaj spektaklaj salonoj, ni pasas ofte al mallarĝaj stratoj, silentaj placetoj — nostalgiaj, romantikaj anguloj de iu Madrid intima kaj kvazaŭ provinca — malnovaj velkigintaj palacoj kaj ŝtonoj, kiuj ŝajnas paroli pri la jaroj de la aŭstra aŭ borbona dinastioj.

Tamen, tiu malnova Madrid, kompare kun la moderna Madrid briliganta samtempe la mil pupilojn de siaj lumaj anoncoj, ne estas iu Madrid danĝera kaj perversa, sed Madrid afabla kaj ridetanta, duonsinjoreca kaj duonlaborista, kun nigraj okuloj post ĉiu balkono garnita de buntaj florpotoj, en stratetoj kie ankoraŭ ekzistas gaslanternoj, kaj kie vi povas ankoraŭ aŭskulti la gajajn notojn de malnovaj gurdoj.

Madrid ne estas monumenta urbo, certe. Ĝi ne estas plena de Historio, kiel estas aliaj urboj en Hispanujo.

Tamen, Madrid posedas iun strangan kaj magian altiron. Ĝi baldaŭ penetras en la koron de la vizitantoj. Ĉu la kaŭzo estas eble la mirinda kaj pura lumo de la urbo? Ĉu la ĝentileco de la madridanoj? Ĉu la beleco kaj ĉarmo de la madridaninoj? La grandaj, belegaj parkoj kaj promenejoj, la larĝaj, sinjorecaj stratoj kaj avenuoj, la intimeco de malnovaj kvartaloj aŭ la senfina arta riĉeco de ĝiaj Muzeoj kaj palacoj? Aŭ estas, tute simple, la mirinda kombinaĵo de tiuj mil diversaj elementoj, kiu faras el Madrid unu el la plej belaj urboj de la mondo?

Kiu scias...! Tamen, venu kaj vidu!



Madrid

Rilate vastecon, Hispanujo estas la tria lando en Eŭropo, kun 503.000 km<sup>2</sup>. La lando posedas kelkajn el la plej altaj montoj de Eŭropo, kaj ankaŭ — post Svisujo — la plej grandan mezan altecon — 600 metrojn sur la marnivelo —. La orografia karakterizo de la lando estas la du centraj altebenaĵoj de Kastilja Malnova kaj Nova, kiuj gajnas altecon ĝisorienten por kunfandiĝi kun la montaroj de Soria kaj Cuenca, descendante poste tra abruptaj deklivoj ĝis la marbordaj ebenaĵoj.

Pli ol tri mil kilometroj da marbordo faras el Hispanujo landon esence maran. La plejmulto el tiu bordaro estas rokoj, sed ekzistas ankaŭ multegaj plaĝoj, kies ora sablo kaj trankvilaj akvoj altiras ĉiujare milionojn da turistoj el la tuta Eŭropo. Norde, la vaskaj provincoj, Santander, Asturias kaj Galicio ĝuas klimaton maran, kun mildaj vintroj, freŝaj someroj kaj oftaj pluvoj. La verdaj kaj fruktodonaj kampoj kontrastas kun la plej malhela nuanco de la arbaroj, dum la valoj similas ŝaktabulon formita el malgrandaj fruktĝardenoj, ofte kovritaj per foliplenaj pomarboj. Tiu regiono estas la Malseka Iberio.

La Seka Iberio restas sude de la Kantabrika Montoĉeno, kiu etendiĝas de la Pirineoj ĝis Asturias.

La nordaj riveroj, mallongaj kaj rapidaj, trapasas belegajn valojn kaj finiĝas en la Kantabrika maro. La grandaj akvofluoj — Miño, Tajo, Guadalkivir — fluas en la Mediteraneon aŭ Atlantikon.

La rivero Ebro, "Patro de Hispanujo", ricevinte la akvojn de alfluriveroj venantaj el la Pirinea montaro, trapasas unu el la plej sekaj regionoj de la lando.

La aliaj riveroj fluiĝantaj en la Mediteraneon estas afriktipaj, foje sekaj kaj foje furioze kreviĝantaj post subitaj pluvegoj.

La nordaj arbaroj formiĝas el kverkoj, kaŝtanoj, fagoj, betuloj kaj pinoj. La mediteranea regiono liveras kverkojn, laŭrojn, kaj ankaŭ olivarbojn, orangojn, citronojn, figojn kaj karobarbojn.

Super la plej altaj montoj de la lando flugas vulturoj kaj agloj, kaj en la montaro de Gredos — ne malproksime de Madrid — oni povas trovi superbajn ekzemplerojn de "capra hispanica". Kelkaj hispanaj riveroj estas riĉaj je salmoj kaj trutoj, kies reproduktado estas oficiale protektita.

Ĉirkaŭ 33.000.000 da loĝantoj troviĝas en Hispanujo, el kiuj proksimume 60% loĝas en la kamparo. Plej loĝataj urboj estas Madrido kaj Barcelono.

# Provizora Programo

La 53-a Universala Kongreso de Esperanto komenciĝos la 3-an kaj fermiĝos la 10-an de aŭgusto 1968.

La kongresaj ĝiĉetoj estos malfermitaj kaj funkcios jam vendredon la 2-an de aŭg.

## I. Manifestacio antaŭ la kongreso

Anoncota.

## II. Kongresaj laboroj

1. Ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A.
2. Fakaj kunvenoj
3. Komitato de U.E.A.
4. Estraro de U.E.A.
5. Akademio de Esperanto

## III. Kulturaj kaj artaj programoj

1. 4-a Internacia Arta Festivalo
2. Teatraj prezentadoj
3. Internacia Somera Universitato
4. Belarta Konkurso
5. Oratora Konkurso
6. Hispana Vespero

## IV. Festoj

1. Interkona Vespero
2. Solena Inaŭguro
3. Kongresa Balo
4. Bankedo
5. Junulara Vespero
6. Ekskursoj
7. Solena Fermo

## V. 11-a Internacia Infana Kongreseto

## VI. Postkongresaj aranĝoj

Postkongreso estas antaŭvidita en Zaragoza.



Zaragoza





Madrid

## Ĝeneralaj Informoj

### Konstanta adreso:

53-a Universala Kongreso de Esperanto, Nieuwe Binnenweg  
176, Rotterdam-2, Nederlando.

### Aliĝoj:

La aliĝantoj sendu la aliĝilon kaj la koncernan pagon al la sama adreso (ne, ekz., la aliĝilon al Peranto kaj la pagon al la adreso de la Kongreso, aŭ inverse). **La aliĝiloj devas esti klare skribitaj, por ke la mencio en la Kongresa Libro estu senerara.**

### Kiel pagi:

1. Pere de la Oficialaj Perantoj de la Kongreso, kies listo aperas en la nuna bulteno.
2. Rekte al la konstanta adreso de la U.K. (Poŝtĉekkonto N. 627337 aŭ Amsterdam-Rotterdam Bank, Rotterdam. Konto no. 690.144.)
3. **Hispanaj aliĝantoj** povas sendi la aliĝilon al: 53-a Universala Kongreso de Esperanto, Poŝtkesto Nr. 19039, Madrid — kaj la koncernan kotizon al: Banko Bilbao, Agencia -0-15, Avno. General Mola 267, Madrid-16, je la nomo de 53-a Esperanto-Kongreso, Konto N. 3.472.

### Kotizo:

La kotizo inkluzivas la tutan programon de la Kongreso, escepte de la ekskursoj kaj bankedo, kaj la rajton utiligi la Loĝigan Servon de la Kongreso. La kotizo devas esti antaŭpagita, kaj ne estas repagebla, eĉ se la aliĝinto ne partoprenos en la Kongreso. Persono kiu pagas la aliĝkotizon por alia, antaŭvidu tion.

Neniu aliĝilo estos traktita antaŭ ricevo de la koncerna pago.

### Rabatoj:

- 1) Individua membro de U.E.A., kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon "Esperanto", **rajtas rabaton de 20,— ned.gld. (330,— pes.);**
- 2) Individua membro de U.E.A., kiu ricevas nur la Jarlibron, **rajtas rabaton de 10,— ned.gld. (165,— pes.);**
- 3) Edz(in)o de individua membro (de ambaŭ kategorioj) **rajtas rabaton de 5,— ned.gld. (82,50 pes.).**  
La rabatoj ne validas por aliaj familianoj, gejunuloj, studentoj, blinduloj.

### N.B.

Kongresano (ne edz-in-o kaj alia kategorio), kiu pagas la plenan kotizon, **ricevas la Revuon "Esperanto" dum la tuta kongresa jaro.**

### Donacoj:

La donacoj montras la solidarecon de la esperantistoj. Oni povas sendi donacojn por la jenaj celoj:

**Literatura Kaso:** Ĝi kontribuas al la valoro de la premioj por la Belarta Konkurso.

**Blindula Kaso:** Ĝin utiligas la Blindula Kongreso.

**Adopta Kaso:** Per ĝi estas helpataj esperantistoj en landoj, kie la transsendo de mono estas malfacila aŭ malpermesita.

**Adoptaj Gepatroj:** Per tiu ĉi Fondaĵo estas helpataj infanoj, kiuj alimaniere ne povus partopreni en la Infana Kongreso. La minimuma kontribuo estas 30,— ned. gld.

KONGRESKOTIZOJ	Ĝis 31.12.67		Ĝis 31.3.68		Ĝis 25.6.68	
	n.gld.	pes.	n.gld.	pes.	n.gld.	pes.
Kongresano	70.—	1190.—	77.—	1310.—	85.—	1445.—
Edz(in)o de kongresano	30.—	510.—	33.50	570.—	37.50	637.—
Junulo ĝis 20-jara	21.—	360.—	23.—	395.—	25.50	433.50
Studento Universitata						
ĝis 30-jara	35.—	595.—	38.50	655.—	42.50	720.—
Blindulo	28.—	475.—	31.—	525.—	34.—	580.—
<b>Pri rabatoj vidu ĉe "Generalaj Informoj"</b>						

**Al la**  
**53-a Universala Kongreso de Esperanto**  
**kore invitas vin**  
**Cef-Generalo Francisco Franco**  
**Statprezidanto de Hispanujo**  
**kaj**  
**La Loka Kongresa Komitato**

Prof. D-ro Miguel Sancho-Izquierdo .....	Prezidanto
D-ro Rafael Herrero Arroyo .....	Vic-Prezidanto
D-ro Jesús Liaño Pacheco .....	Vic-Prezidanto
S-ro G. G. Pompilio .....	Konstanta Kongresa Sekretario
F-ino Inés Gastón Burillo .....	Sekretariino
S-ro Manuel Martín Gomez .....	Protokolsekretario
Prof. Manuel Figuerola Palomo .....	Kasisto
D-ro Santos P. Arranz .....	Ekskursia Servo
S-ro Félix Gomez Martín .....	Loĝiga Servo
Prof. Angel Figuerola Auque .....	Hispana gazetaro
S-ro Julio Juanes Sainz .....	Esperanta gazetaro
F-ino Visitación Martín Gomez .....	Infana Kongreseto
S-ro Pedro Hernandez .....	Junularaj Aranĝoj
S-ro Antonio Moya Casado .....	Artaj Aranĝoj
S-ro Miguel G. Diez Diez .....	Membro
S-ro Raimundo Ibañez .....	Membro
S-ro Tomás Ortiz .....	Membro

## Oficialaj Perantoj

- Aŭstrujo:** Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16-18, Wien-XV
- Belgujo:** S-ro F. Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, Antwerpen; Pĉk. 90.51.25
- Britujo:** Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., London, W. 11
- Danlando:** C.D.E.L., Kongresvojaĝa Servo, S-ro G. Kühlmann, Løvetandsvej 31, København Bhr. Poŝtĉekkonto: 706.17
- Finnlando:** S-ro Joel Vilkki, Somero, Poŝtĉekkonto: Tu 60253
- Francujo:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 rue de Chabrol, Paris X, Poŝtĉekkonto: 855-35
- Germanujo:** Germana Esperanto-Asocio, Welsersstr. 69, P.f. 2113, 85 Nürnberg, 2 P.ĉ.k. 2565
- Italujo:** Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, Torino
- Meksiko:** M.E.F., P.k. 10.576, Madero 8-312, Mexico 1, D.F.
- Nederlando:** Nederlanda Esperantista Asocio "L.E.E.N.", S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.) P.ĉ.k. 34563
- Norvegujo:** Turisma Servo de Norvega Esperantista Ligo, Boks 942, Oslo, Poŝtĉekkonto 100 32
- Svedujo:** Sveda Esperanto-Federacio, E. Andrén, Rytmästargatan 12 4 v, Malmö V.
- Usono:** S-ro Conrad Fisher, R.F.D.1, Calvin St., Meadville-Pa.  
S-ro D. E. Parrish, 328 W, 46th, St., Los Angeles 37-Calif.

### INFORMCENTROJ

- Ĉeĥoslovakujo:** Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, Blanická 4, Praha 2
- Jugoslavio:** Jugoslavia Esperanto-Ligo, Dobrinjska 12, Beograd
- Pollando:** Pola Esperanto-Asocio, Nowy Świat 27, Waszawa
- Sovetunio:** Iniciata Grupo de Sovetia Esperantistaro, poŝtkesto 1004, Moskva
- Svisujo:** S-ro O. Walder, Esperanto-Str., 8590 Romanshorn